

Parto unua. ROBINZONO

ĈAPITRO UNUA

Maksim iom malfermis lukon, eliĝis kaj singarde rigardis la ĉielon. La ĉielo tie ĉi estis malalta kaj ia dura, sen tiu frivola diafano, aludanta senfundon de la kosmo kaj multnombron da loĝataj mondoj, — la vera biblia firmaĵo, glata kaj nepenetrebla. La firmaĵo, sendube, sin apogis sur potencajn ŝultrojn de iu loka Atlanto kaj regulece fosforeskis. Maksim serĉetis en la zenito la truon, faritan de la spacŝipo, sed la truo tie ne estis — nur disfluis tie du grandaj nigraj makuloj, kvazaŭ gutoj da tuĉo en akvo. Maksim plene malfermis la lukon kaj desaltis en altan sekan herbon.

La aero estis varmega kaj densa, odoris polve, malnovfere, premherbe, vive. Ĉeestis ankaŭodoro de morto, iama kaj nekomprenbla. La herbo atingis lumbon, nefore malhelis arbustaro, streĉiĝis iel-tiel enuaj, kurbetaj arboj. La lumo similis tiun de hela luna nokto sur Tero, sed mankis lunombroj kaj mankis la luna nebula helbluo, ĉio estis griza, polva, plata. La ŝipo staris sur la fundo de giganta kavaĵo kun plataj deklivoj, la ĉirkaŭaĵo rimarkeble leviĝis al la neklara horizonto, kaj tio estis stranga, ĉar ie apude fluis rivero, granda kaj kvieta, fluis okcidenten, supren laŭ deklivo de la kavaĵo.

Maksim ĉirkaŭiris la ŝipon, movante manplaton laŭ ties malvarma, iom humida flanko. Li trovis spurojn de la

frapoj ĝuste tie, kie li supozis. Profunda malagrabra enpremaĵo sub la indikilringo — ĝi aperis kiam la ŝipo estis subite ĵetita kaj klinita flanken, pro kio la kiberpiloto ofendiĝis, kaj Maksim devis haste kapti la stirilon, jen ankaŭ breĉeto apud la dekstra pupilo — ĝi aperis dek sekundojn poste, kiam la ŝipo estis ĵetita alpruen kaj iĝis unuokula. Maksim denove rigardis la zeniton. La nigraj makuloj nun apenaŭ videblis. Meteoratako en stratosfero, probablo — nulo komo nulo-nulo... Tamen ja ĉiu ebla evento iam efektive okazas...

Maksim ŝovis sin en la kabinon, transŝaltis aparaton al aŭtoriparo, funkciigis ekspreslaboratorion kaj startis al la rivero. Estas ĝi aventuro, certe, sed tutegale — rutino. Enuajĵo. En nia GLS eĉ aventuroj rutinas. Meteoratako, radiatako, averio dum alteriĝo. Averio dum alteriĝo, meteoratako, radiatako... Aventuroj de l'korpo.

La alta, rompiĝanta herbaro susuris kaj kraketis subpiede, pikaj semoj penetris ŝorton, zumsone ekatakis nubo da ia muŝetaro, porsekunde amasiĝis antaŭ la vizaĵo kaj deflankiĝis. Plenaĝaj solidaj personoj ne aliĝas la Grupon de Libera Serĉo. Ili havas proprajn plenaĝulajn aferojn, kaj ili scias, ke tiuj fremdaj planedoj laŭsence estas sufiĉe similaj kaj lacigaj. Monotone-lacigaj. Lacige-monotonaj... Certe, se vi havas dudek jarojn, se vi nenion lerte kapablas fari, se vi ne scias certe, kion vi dezirus kapabli, se vi ne spertas dume aprezi vian ĉefan posedaĵon — la tempon, se vi ne havas kaj eĉ ne antaŭvidas iajn specialajn talentojn, se la dominanto de via vivo en la dudekjara aĝo, samkiel antaŭ dek jaroj, restas ne kapo, sed brakoj kaj kruroj, se vi tiom primitivas, ke vi imagas, kvazaŭ en nekonataj planedoj vi povas trovi ian valoraĵon, neeban sur la Tero, se, se... tiam, do — certe. Tiam prenu la katalogon, malfermu ĝin ĉe iu ajn paĝo, ŝovu fingrojn al iu ajn linio kaj flugu, do. Malkovru la planedon, donu al ĝi vian propran nomon, determinu la fizikajn karakterizojn, batalu kontraŭ monstroj, se troviĝos tiuj, kontaktu, se troviĝos iu por tio, robinzonu poiomete, se vi trovos neniun... Kaj ne opiniu ĉion ĉi vana. Oni dankos vin, oni diros al vi, ke vi faris laŭeban kontribuon, iu merita fakulo vin vokos por detala konversacio... lernejanaj, precipe malbone progresantaj kaj nepre de plej junaj klasoj, okulumos vin kun respekto, sed

la Instruisto nur demandos ĉe renkonto: «Ĉu vi plu restas en GLS?» — kaj ŝanĝos la temon, kaj vizaĝo lia estos kulpa kaj sopira, ĉar la respondecon pro via pluresto en GLS li prenas sur sin, kaj la patro diros: «Ĥm...» — kaj dubvoĉe proponos al vi postenon de labhelpanto, kaj panjo diros: «Maksiĉjo, vi ja nemalbone pentris en infanaĝo...» — kaj Oleg diros: «Kiom do plu? Ĉesu malhonorigon...» — kaj Ĵenni diros: «Konatiĝu, jen estas mia edzo». Kaj ĉiuj ili pravos, ĉiuj, krom vi. Kaj vi revenos en la Administrejon de GLS kaj, penante ne rigardi al du similaj ŝtipkapuloj, fosantaj la katalogojn ĉe apuda bretaro, prenos vican volumon, malfermos hazardan paĝon kaj ŝovos fingron...

Antaŭ ol descendi laŭ deklivo al la rivero, Maksim ririgardis. Malantaŭ li hirtiĝis, rerektiĝante, la herbo tretita de li, nigris en ĉielfono kurbaj arboj kaj lumis la rondeto de ovrita luko. Ĉio estis tre kutima. Do, bone, diris li al si mem. Ĉiu agu laŭkapable. Estus bone trovi civilizon — potencon, antikvan, prudentan. Kaj homan... Li descendis al akvo...

Efektive, la rivero estis granda, lanta, kaj perokule percepteblis ties descendo de oriento kaj ascendo okcidenten. (Tamen, refrakto ĉi tie estas monstra...) Kaj videblis, ke la alia bordo estas plata kaj kovrita de densa kanaro, kaj je kilometro supren laŭflue elakviĝis iuj fostoj kaj kurbaj traboj, kliniĝintaj kradozaj ĉevronaroj, vilaj pro la volviĝantaj kreskaĵoj. Civilizo, pensis Maksim sen troa entuziasmo. Li sentis ĉirkaŭe multon da fero kaj ion ankoraŭ, malagrablan, sufokan, kaj kiam Maksim ĉerpis akvon per manplato, li komprenis, ke tio estas radiado, sufiĉe forta kaj maligna. La rivero portis de oriento radioaktivaĵojn, kaj Maksim komprenis klare, ke nemultan utilon donos tiu ĉi civilizo, ke refoje estas io senbezona, ke eĉ ne endas iniciati kontakton, sed necesas fari laŭnormajn analizojn, du tri foje nerimarkeble ĉirkaŭflugi la planedon laŭekvatore kaj forbalaigi, kaj sur la Tero transdoni la materialojn al mornaj, multon vidintaj oĉjoj el la Komisiono pri galaksia sekureco kaj haste forgesi pri ĉio.

Li kun abomeno skuis la fingrojn kaj viŝis ilin per sablo, poste sidiĝis kaŭre kaj enpensiĝis. Li provis imagi loĝantojn de tiu ĉi planedo — la planedo apenaŭ bonfarta. Ie trans arbaroj estis urbo, la urbo apenaŭ bonfarta, malpuraj

uzinoj, forĵetantaj akven radioaktivan fatrason, malbelaj, hororigaj domoj sub feraj tegmentoj, multo da muroj kaj malo da fenestroj, kortaj spacetoj inter la domoj, plenegitaj da rubo kaj kadavroj de hejmbestoj, granda kavo ĉirkaŭ la urbo kaj levataj pontoj... kvankam ne, tio estis antaŭ uzinoj... Kaj la homoj. Li provis imagi tiujn homojn, sed ne sukcesis. Li nur sciis, ke ili tro multon vestas. Ke ili, fakte, estas pakitaj en dikan krudan tolon, kaj ili havas altajn blankajn kolumojn, frotantajn mentonon. Poste li rimarkis spurojn sur la sablo.

Tiuj estis la spuroj de nudaj piedoj. Iu descendis de sur la deklivo kaj foriris en la riveron. Iu, posedanta grandajn, larĝajn piedplatojn, peza, kurbokrura, nelerta — sendube, homtipa, sed liaj piedoj havis po ses fingrojn. Ĝemante kaj graketante li rampis de sur deklivo, stumbliris sur sablo, kun plaŭdo mergis sin en radioaktivan fluaĵon kaj, snufante, ronketante eknaĝis al la alia bordo, en kanaron. Ne demetinte la altan blankan kolumon...

Brila, blua ekflamo lumigis ĉion ĉirkaŭ li, kvazaŭ fulmo falis, kaj tuje super la deklivo io ektondris, eksiblis, ekkrakis fajre. Maksim salte leviĝis. Laŭ la deklivo ŝutiĝis seka grundo, io kun danĝera jelpo traflugis enĉiele kaj falis meze de la rivero, levinte fontanon da ŝpruceroj, miksitaj kun blanka vaporo. Maksim haste ekkuris supren laŭ la deklivo. Li jam sciis, kio okazis, li ne komprenis nur kial tio okazis, kaj li ne miris, kiam li ekvidis en la loko, kie ĵus estis staranta la ŝipo, volviĝantan foston da inkandeska fumo, kvazaŭ giganta spiralo forirantan en la fosforeskan ĉielan firmaĵon. La ŝipo krevis, la ceramida ŝelo brulegis viollume, gaje brulis la ĉirkaŭa seka herbaro, flamis arbustaro kaj fumfajrete ekbrulis la kurbaj arboj. La fera ardego batis la vizaĝon, kaj Maksim ŝirmis sin per manplato kaj retiriĝis laŭlonge de la deklivo, — unu paŝon, poste unu paŝon pli, poste ankoraŭ kaj ankoraŭ, — li retiriĝis, ne forigante okulojn de tiu pompa belo de la arda torĉo, disŝutanta puncajn kaj verdajn fajrerojn, de tiu subita vulkano, de la sensenca furiozo de liberiĝinta energio.

Tamen, kial do ne, ĉagrene pensis li. Aperis granda simio, ekvidis, ke mi forestas, enrampis internen, levis la ferdekon — mi mem ne scias, kiel oni faras tion, sed ĝi divenis, inteligenta do estis la simio, sesfingra, — levis ĝi

do la ferdekon... Kio estas tie, enŝipe sub la ferdeko?.. Unuvorte, trovis ĝi akumulatorojn, prenis grandan ŝtonon kaj — krak!.. Tre grandan ŝtonon, ĉirkaŭ tri tunojn pezan kaj — svinge... Grandega tia simio... Pereigis ĝi finfine mian ŝipon per siaj ŝtonegoj — dufoje en la stratosfero, kaj nun jen... Mirinda historio... Similaĵoj ŝajne antaŭ nun ne okazis. Kion do, tamen, mi faru nun? Baldaŭ, certe, oni ekserĉos min, sed eĉ kiam oni ekserĉos, do, apenaŭ opinio tion ebla: la ŝipo pereis, sed la piloto restis viva... Kio do estos nun? Panjo... Patro... Instruisto...

Li turnis sin perdorse al la incendio kaj iris for. Li rapide paŝis laŭlonge de la rivero, ĉio ĉirkaŭ li estis lumigita per ruĝa lumo, antaŭ li saltadis, kurtiĝante kaj oblongiĝante, lia ombro sur la herbo. Dekstre komenciĝis arbaro, maldensa, putrodora, la herbaro iĝis mola kaj humida. Du grandaj noktaj birdoj brue levigis el-sub la piedoj kaj malalte super akvo ekŝvebis aliflanken. Li distrite pensis, ke la fajro povas atingi lin, kaj tiuokaze li devos foriri naĝe, kaj tio ne agrablos, sed la ruĝa lumo subite malheliĝis kaj estingiĝis plene, kaj li konjektis, ke la kontraŭincendiaj instalaĵoj, diference de li, tamen divenis la okazon kaj plenumis sian taskon kun precizeco, propra por ili. Li vive imagis fulgokovritajn, fandiĝintajn balonojn, strange elstarantajn inter varmegaj fragmentoj, eligantajn pezajn nubojn da pirofago kaj tre memkontentaj...

Trankvilon, pensis li. Plej gravas — agi senhaste. Mi havas tempon. Verdire, mi havas amasegon da tempo. Ili povas min serĉi senfine: la ŝipo mankas, kaj min ne eblas trovi. Sed, antaŭ ol ili komprenos, kio okazis, antaŭ ol ili fincertiĝos, antaŭ ol ili estos tute certaj, ili nenion komunikos al panjo... Kaj mi do tie ĉi ion elpensos...

Li preterpasis negrandan malvarmetan marĉon, trape-netris arbustaron kaj trovis vojon, malnovan multfandan betonvojon, etendiĝantan en arbaron. Li aliris randon de la deklivo, paŝante laŭ betonaj platoj, kaj ekvidis rustajn, volvitajn de konvolvuloj ĉervonarojn, restaĵojn de iu grandampleksa kradoza konstruaĵo, duonmergiĝintajn akven, sed en la alia flanko — daŭrigon de la vojo, apenaŭ videblan sub lumanta ĉielo. Evidente, iam estis ponto ĉi tie. Kaj, evidente, la ponto malhelpis iun, kaj oni ĝin faligis en riveron, pro kio ĝi fariĝis nek pli bela nek pli oportuna.

Maksism sidiĝis sur la deklivrandon kaj etendis krurojn suben. Li esploris sin deinterne, certiĝis ke li neniom hastas, kaj ekmeditis.

La ĉefaĵon mi trovis. Jen, do, la vojo. Malbona vojo, kruda vojo kaj aldone antikva vojo, kaj tamen ĝi estas vojo, kaj en ĉiuj loĝataj planedoj vojoj kondukas al tiuj, kiuj ilin konstruis. Kion mi bezonas? Nutraĵon mi ne bezonas. Certe, mi manĝetus, sed tio estas laboro de miaj pra-instinktoj, kiujn mi tuj estingos. Akvon mi bezonos ne pli frue ol post unu tagnokto. Aero sufiĉas, kvankam mi preferus, ke en la atmosfero estu malple da karbacio kaj radioaktivaj malpuraĵoj. Sekve, nenion malnoblan mi bezonas. Sed bezonas mi negrandan, ni diru veron — primitivan nul-komunikilon kun spiralmovo. Kio povas esti pli simpla ol primitiva nul-komunikilo? Nur primitiva nul-akumulatoro... Li fermis la okulojn, kaj en la memoro klare aperis la skemo de komunikilo el pozitronaj emiteroj. Se li havus la detalojn, li muntus tiun aĵon dumomente, ne malfermante la okulojn. Li kelkfoje enpense faris la muntadon, sed kiam li malfermis la okulojn, la komunukilo ne estis. Kaj nenio estis. Robinzono, pensis li eĉ kun ioma intereso. Maksim *Kruzoe*. Okazas ja tio — nenion mi havas. Ŝortojn sen poŝoj kaj kedojn. Sed, tamen, la insulon mi havas — loĝatan... Kaj se la insulo estas loĝata, sekve, ĉiam estas la espero pri primitiva nul-komunikilo. Li pene pensis pri nul-komunikilo, sed li sukcesis nemulte. Li dum tuta tempo vidis panjon, kiel oni informas ŝin: «Via filo malaperis senpostsigne», kaj kian vizaĝon ŝi havas, kaj kiel la patro frotas siajn vangojn kaj embarasite ĉirkaŭrigardas, kaj kiom malvarme kaj solece ili sin sentas... Ne, diris li al si mem. Pri tio ĉi mi malpermesas pensi. Pri kio ajn, nur ne pri tio ĉi, aliokaze mi nenion sukcesos. Mi ordonas kaj malpermesas. Mi ordonas ne pensi kaj mi malpermesas pensi. Punkto. Li leviĝis kaj ekpaŝis laŭ la vojo.

La arbaro, dekomece ĝenema kaj maldensa, poiome kuraĝiĝis kaj proksimiĝis al la vojo pli kaj pli. Kelkaj orgojlaj junaj arbetoj rompis betonon kaj kreskis en la ŝoseo mem. Evidente, la vojo havis kelkdek jarojn — ĉiuokaze, dum kelkdek jaroj ĝi ne estis uzata. La arbaro ambaŭflanke iĝis pli alta, pli densa, pli sovaĝa, ie-tie branĉoj de la arboj interplektiĝis super la kapo. Venis krepusko, jen dekstre,

jen maldekstre en densejo aŭdiĝis laŭtaj raŭkaj ekkrioj. Iu moviĝis tie, susuris, piedfrapis. Unu fojon iu nealta kaj malhela, kliniĝinte, transkuris la vojon dudek paŝojn antaŭe. Tinte zumis muŝetaro. Subite la kapon de Maksim venis penso, ke la regiono estas tiom forgesita kaj sovaĝa, ke li povas ne trovi homojn en proksimo, ke por atingi ilin li bezonos kelkajn tagnoktojn. La prainstinktoj vekigis kaj denove memorigis pri si. Sed Maksim sentis, ke ĉi tie ĉirkaŭ li estas tre multe da viva karno, ke pro malsato li ne pereos tie ĉi, ke ĉio ĉi apenaŭ bongustas, tamen la ĉasado estos interesa, kaj ĉar li malpermesis pensadon pri la ĉefaĵo, li komencis rememori, kiel li ĉasadis kun Oleg kaj kun ĉasisto Adolf — necesis nur permane, ruzo kontraŭ ruzo, racio kontraŭ instinkto, forto kontraŭ forto, dum tri tagnoktoj senhalte peladi cervon tra arborubo, atingi kaj faligi teren, kaptinte kornojn... Cervoj tie ĉi eble ne estas, tamen, sendube loka bestaro estas manĝebla: sufiĉas nur enpenŝiĝi, distriĝi, por ke la muŝetaro furioze vin ekvoru, sed ja estas konata la fakto — manĝeblulo en fremda planedo ne mortos pro malsato... Ne malbonus misvojiĝi tie ĉi kaj pasigi unu-du jarojn, vagante tra arbaroj. Mi trovus por mi kompanon — ĉu iun lupon aŭ urson? Tiam ĉasus ni kune babiladus... Certe, tedus ĉio ĉi, finfine... kaj ne similas ja, ke en tiuj ĉi arbaroj eblas vagi kun plezuro: ĉirkaŭaĵo entenas tro multe da fero — apenaŭ eblas spirado... Kaj plu, tamen dekomence necesas munti nul-komunikilon...

Li haltis, fiksaŭskultante. Ie en fundo de la densarbaro aŭdiĝis monotona obtuza muĝado, kaj Maksim rememoris, ke jam delonge li aŭdas tiun muĝadon, sed nur nun li ekatentis ĝin. Tio estis nek besto, nek akvofalo — ĝi estis mekanismo, iu barbara maŝino. Ĝi ronkis, ekraŭkadis, grinis metale kaj vastigis malagrablan rustodoron. Kaj ĝi proksimiĝis.

Maksim kliniĝis kaj, restante proksime al la vojrandoj, senbrue ekkuris renkonten, sed poste haltis, apenaŭ elsaltinte al la vojkruciĝo. La vojon rektangule krucis alia ŝoseo, tre malpura, kun profundaj makabraj vojsulkoj, kun elstarantaj rompopoj de iama betontegaĵo, malbonodora kaj tre, tre radioaktiva. Maksim ekkaŭris kaj rigardis maldekstren. Motormuĝado kaj metalgrincado proksimiĝis de tie. La grundo subpiede ekstremis. Ĝi proksimiĝis.

Post minuto ĝi aperis — sence grandega, varmega, fetora, plene konsistanta el nitita metalo, tretanta la vojon per monstraj kotkovritaj raŭpegoj, ĝi ne fulmrapidis, ne ruliĝis — ĝi atakrampis, ĝiboza, nezorgita, tintaĉante per deŝiritaj ferplatoj, plenŝtopita de kruda plutonio kaj lantanidoj poduone, senhelpa, minacanta, senhoma, stulta kaj danĝera, — ĝi transrampis la vojkruciĝon kaj rampis plu, krakante kaj grincante per la premata betono, lasinte malantaŭ si spurvoston da inkandeska sufoko, malaperis en arbaro kaj plu blekis, balbutegis, ekmuĝadis, poiome silentiĝante en foro.

Maksim trankviligis spiron, svinge forpelis muŝetaron. Li estis ŝokita. Neniam en la vivo li vidis ion same sensencan kaj mizeran. Do, pensis li. La pozitronajn emiterojn mi ne trovas tie ĉi. Li sekvis perrigarde la monstron kaj subite rimarkis, ke la krucvojo estas ne simpla vojo, sed arbarstrato, mallarĝa fendo en la arbaro: arboj ne ŝirmis ĉielon super ĝi, kiel tio estis super la ŝoseo. Eble mi postkuru ĝin? — pensis li. Eble mi ĝin haltigu, estingu la kaldronon... Li fiksaŭskultis. En arbaro plu restis bruoj kaj krakado, la monstro ruliĝis en la densejo, samkiel hipopotamo en marĉego, poste muĝado de la motoro komencis proksimiĝi. Ĝi revenis. Denove snufado, raŭkado, fetora ondo, tintaĉo kaj grincado, kaj jen ĝi denove ruliĝas trans la vojkruciĝon kaj aroge iras tien, de kie ĝi eliris ĵus... Ne, diris Maksim. Ne volas mi pri ĝi okupiĝi. Ne ŝatas mi koleraĵojn kaj barbarajn aŭtomatojn... Li ĝisatendis malaperon de la monstro, eliris el arbustaro kaj per unu movo transsaltis la disŝiritan infektitan vojkruciĝon.

Iom da tempo li iris tre rapide, profunde spirante, liberigante pulmojn de la haladzo, produktaĵo de la fera hipopotamo, kaj poste denove ŝanĝis iron al la kutima marŝo. Li pensis pri tio, kion li ekvidis dum la unuaj du horoj da vivo en sia loĝata insulo, kaj li provis kunmeti ĉiujn ĉi kuriozaĵojn kaj hazardaĵojn en ion logike senkontraŭdiran. Tamen tio estis tro malfacila afero. Aperis la bildo fabela, sed ne reala. Fabela estis tiu ĉi arbaro plenŝtopita de malnovaj feraĵoj, fabelaj estaĵoj interkriis en ĝi per preskaŭ homaj voĉoj; samkiel en fabeloj, malnova forgesita vojo kondukis al sorĉita kastelo, kaj neimageblaj malicaj sorĉistoj penis malhelpi homon, trafintan en ĉi-landon. En foraj

aliroj ili atakis lin per meteoroj, tamen senrezulte, kaj tiam ili forbruligis la ŝipon, venigis lin en kaptilon, poste incitis kontraŭ li la feran drakon. La drako, tamen, montris sin tro olda kaj stulta, do ili verŝajne jam komprenis sian misagon kaj nun preparas ion pli modernan.

— Aŭskultu, — diris al ili Maksim. — Ja mi ne intencas malsorĉi kastelojn kaj veki viajn letargiajn belulinojn, mi volas nur renkontiĝi kun iu el vi, iu pli saĝa, kiu helpos min pri pozitronaj emiteroj...

Sed la malicaj sorĉistoj plu daŭrigis siajn sorĉadojn. Komence ili metis transverse de la ŝoseo grandegan putran arbon, poste ili detruis la betonan tavolon, fosis en grundo grandegan kavon kaj plenigis ĝin per mucida radioaktiva likvaĵaĉo, sed kiam eĉ tio ne efikis, kiam la muŝetaro laciĝis piki kaj senreviĝinte apartiĝis, jam antaŭ mateno ili el-lasis el la arbaro malvarman malican nebulon. Pro tiu nebulo Maksim ekfrostetis kaj ekhastis kure por varmigi sin. La nebulo estis glueca, oleoza, odoranta je malseka metalo kaj putrado, sed baldaŭ aperis fumodoro, kaj Maksim komprenis, ke ie en proksimo brulas viva fajro.

Ekflagris aŭroro, ĉielon heligis matena grizo, kaj Maksim ekvidis flanke de la vojo lignofajron kaj nealtan ŝtonan konstruaĵon kun falinta tegmento, kun malplenaj nigraj fenestroj, malnovan, muskokovritan. Homoj ne videblis, sed Maksim sentis, ke ili estas ie nefore, ke ili antaŭ nelonge estis tie ĉi kaj, eble, baldaŭ revenos. Li turnis sin for de la ŝoseo, transsaltis apudvojan tranĉeon kaj, ĝismaleole dronanta en putranta foliaro, proksimiĝis al la fajro.

La lignofajro renkontis lin per bona pratempa varmo, agrable incitinte la prainstinktojn. Ĉi tie ĉio estis simpla. Li rajtis sensalute ekkaŭri, etendi manojn al la fajro kaj silente atendi ĝis kiam la mastro, same silente, transdonos varmegan pecon kaj varmegan tason. Verdire, la mastro forestis, sed super la lignofajro pendis fulgokovrita kaldrono kun kuirajo, akre odoranta, iom flanke kuŝis du ĉifitaj frokoj el kruda ŝtofo, malpura duonplena sako kun rimenoj, grandegaj kruĉoj el ĉifita lado kaj ankoraŭ iuj feraj objektoj por nekonata uzo.

Maksim iom sidis ĉe la fajro, varmiĝis, rigardante ĝin, poste leviĝis kaj eniris la domon. Verdire, de la domo restis nur ŝtona skatolo. Tra rompitaĵ traboj super la kapo he-

lis matena ĉielo. Timinda estis la paŝo sur putrajn latojn de la planko, ĉiungule kreskis traŭboj da frambokoloraj fungoj — venenaj, sed plentaŭgaj por manĝo post bona fritado. Cetere, la penso pri manĝo tuj malaperis, kiam Maksim rimarkis en apudmura duonmorno ies ostojn, miksitajn kun senkoloriĝintaj ĉifaĵoj. Li eksentis naŭzon, turniĝis, descendis laŭ detruitaj ŝtupoj kaj, kunmetinte manplatojn kiel sontubon, ekkriegis tra la tuta arbaro: «Oho-ho, sesfingruloj!» La eĥo preskaŭ momente dronis en la nebulo inter arboj, neniu rekriis, nur iuj birdaĉoj superkape ektintis kolere kaj ekscitite.

Maksim revenis al la lignofajro, ĵetis branĉojn en la fajron kaj enrigardis la kaldronon. La kuirajo bolis. Li rigardis ĉirkaŭflanken, trovis ion similan al kulero, flaris ĝin, viŝis per herbo kaj denove flaris. Poste li singarde forigis grizetan ŝaŭmon kaj skuis ĝin for sur karbojn. Li kirlis la kuirajon, ĉerpis ĵom deflanke, blovetis kaj, etendinte lipojn, gustumis. Ĝi ŝajnis al li ne malbongusta, iom simila al supajo el tahorga hepato, nur pli akragusta. Maksim metis la kuleron, zorgeme, per du manoj prenis la kaldronon kaj metis sur herbon. Poste li denove ĉirkaŭrigardis kaj laŭte diris: «Matenmanĝo pretas!» Lin ne lasis la sento, ke la mastroj ie apudas, sed vidis li nur senmovajn, malsekajn pro nebulo arbustojn, nigrajn, sulkiĝintajn arbotrunkojn kaj aŭdis nur kraketadon de la lignofajro, klopodemman birdan interkriadon. «Nu bone, — diris li laŭtvoĉe. — Vi — kiel vi volas, sed mi komencas la kontakton».

Li tre rapide kaptis la guston. Ĉu la kulero estis tro granda, aŭ la prainstinktoj ekbolis supernorme, sed li preskaŭ momente elsorbis trionon da enkaldronaĵo. Tiam li formovis sin kun bedaŭro, kelkmomente sidis, atentante la guston, zorgeme viŝis la kuleron, sed ne detenis sin kaj ĉerpis ankoraŭfoje el la fundo tiujn apetitajn, degelantajn en buŝo brunajn pecetojn, similajn al markolbaso, tute formovis sin, denove viŝis la kuleron kaj metis ĝin trans la kaldronon. Nun venis la ĝusta tempo por kontentigi senton de dankemo.

Li salte leviĝis, elektis kelkajn maldikajn branĉetojn, kaj direktis sin en la domon. Singarde paŝante laŭ putraj latoj, kun peno ne ririgardi homrestaĵojn en la ombro, li komencis derompi la fungojn kaj surbranĉetigi la frambokolorajn ĉapeletojn, elektante plej freŝajn. Se mi povus

vin sali, pensis li, ankaŭ pipri iom, tamen, ne gravas, por la unua kontakto taŭgos eĉ tio ĉi. Mi pendigu vin super fajreto, kaj la tuta aktiva organikaĵo foriĝos el vi vapore, kaj iĝos vi — festo por gusto, kaj iĝos vi mia unua kontribuo en la kulturon de tiu ĉi loĝata insulo, sed la dua estos la pozitronaj emiteroj...

Sed subite aperis iom pli da mallumo en la domo, kaj li tuj eksentis, ke iu rigardas lin. Li ĝustatempe estingis en si la deziron turniĝi abrupte, kalkulis ĝis dek, malrapide leviĝis kaj senhaste, kun anticipe preta rideto, turnis la kapon.

Trans fenestro lin rigardis longa malhela vizaĝo kun tristaj okuloj, kun sopire falintaj lipanguloj, rigardis sen ia intereso, sen malico kaj sen ĝojo, rigardis ne la homon el alia mondo, sed simple la tedeman hejmbeston, denove enrampantan al malpermesata loko. Kelksekunde ili rigardis unu la alian, kaj Maksim sentis, kiel la tristo, fluanta de tiu vizaĝo, inundas la domon, superverŝas la arbaron kaj la tutan mondon ĉirkaŭ ĝi, kaj ĉio apuda fariĝis griza, trista kaj priplorinda, ĉio jam okazis, okazis multfoje kaj ankorau okazos multfoje, kaj ne antaŭvideblas iu savo de tiu griza, trista, priplorinda enuo. Poste la domo iĝis eĉ pli malluma, kaj Maksim turnis sin al la pordo.

Tie, disiginte firmajn mallongajn kruojn, barinte per larĝaj ŝultroj tutan pordotruon, staris fortaspekta homo, plene kovrita per rufa hararo, vestita en aĉan kvadratitan kombineon. Tra la bunta rufa kreskaĵo rigardis al Maksim borantaj bluaj okuletoj, tre streĉaj, tre koleraj kaj, malgraŭ tio, iaj gajaj — eble, pro kontrasto kun la tristo tutmonda, fluanta de la fenestro. Tiu haroza bubo evidente ankaŭ ne la unuan fojon vidis venintojn el alia mondo, sed li kutimis trakti tiujn tedintajn venintojn rapide, krude kaj decideme — sen iaj-tiaj kontaktoj kaj ceteraj nebezonataj komplikaĵoj. Sur lia kolo pendis sur leda rimeno dika metala tubo, havanta plej terurigan aspekton, kaj la paftruon de tiu armilo por trakti venintojn li direktis per dura malpura mano ĝuste en la ventron de Maksim. Tuj videblis, ke li neniel aŭdis pri la supera valoro de homa vivo, nek pri la Deklaracio de homaj rajtoj, nek pri la ceteraj brilaj inventoj de supera humanismo, samkiel ankaŭ pri la humanismo mem, kaj eĉ se iu rakontus al li pri tiuj aferoj — li ne kredus.

Tamen Maksim ne havis la elekton. Li etendis antaŭ si la branĉeton kun trapikitaj fungoĉapeletoj, ridetis eĉ pli larĝe kaj prononcis kun troigita artikulacio: «Paco! Amikeco!» La trista persono trans fenestro reehis al tiu slogano per longa nekomprenebla frazo, poste liberigis la placon de kontakto kaj, se juĝi laŭ sonoj deekstere, komencis ĵetadi en lignofajron sekan branĉaron. La hirtita rufa barbo de la bluokululo ekmoviĝis, kaj el la kupra arbustaro aŭdiĝis raŭkaj, ekblekantaj, grincantaj sonoj, rememorigintaj al Maksim la feran drakon en vojkruciĝo.

— Jes! — diris Maksim, energie jesante perkape. — Tero! Kosmo! — Li pikis per branĉeto zeniton, kaj la rufbarbulo obeeme rigardis al la rompita plafono. — Maksim! — daŭrigis Maksim, montrante al sia brusto. — Maksim! Mia nomo estas Maksim! — Por plia konvinkindo li frapis sian bruston, kvazaŭ kolerigita gorilo. — Maksim!

— Maĥĥ-ssim! — elblekis la rufbarbulo kun stranga akĉento.

Ne forigante rigardon de Maksim, li eligis transŝultren serion da tondrantaj kaj grincantaj sonoj, en kiu kelkfoje ripetiĝis la vorto «Maĥ-sim», al kio responde la nevidebla trista persono komencis eligi terurajn sopirajn fonemojn. La bluaj okuloj de rufbarbulo eliĝis, malfermiĝis la flavdenta faŭko kaj li ekridegis. Evidente, la humureco de la situacio, nekomprenebla por Maksim, atingis fine la rufbarbulon. Satridinte, la rufbarbulo viŝis okulojn per libera mano, mallevis sian mortigan armilon kaj faris por Maksim tute klaran geston, kun la signifo: «Do, eliru!»

Maksim obeis kun plezuro. Li eliris sur peronon kaj denove etendis al la rufbarbulo branĉeton kun fungoj. La rufbarbulo prenis la branĉeton, turnis ĝin tiel-aliel, flaretis kaj forĵetis flanken.

— Ne, ne! — oponis Maksim. — Vi poste la fingrojn lekos...

Li klinis sin kaj prenis la branĉeton. La rufbarbulo ne kontraŭis. Li plaŭdetis la dorson de Maksim, puŝetis lin al la fajro, kaj ĉe la fajro apogis sin al lia ŝultro, sidigis kaj komencis enkapigi ion. Sed Maksim ne aŭskultis. Li rigardis la tristulon. Tiu sidis kontraŭe kaj sekigis antaŭ la fajro iun vastan, malpuran ĉifonon. Unu lia piedo estis nuda, kaj li tuttempe movis la fingrojn. Kaj da tiuj fingroj estis kvin. Kvin, sed tute ne ses.